

Eldonantaro:
 D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
 W. M. Page, adv., Edinburgh
 Ernest Archdeacon, Paris
 J. Gili Norta, Barcelona
 Teo Jung, Köln (Kolonia)
 Frans Schoofs, Antwerpen
 P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administraro:
 Horrem bei Köln, Germ.
 Postkonton Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
 Ĉefredaktoro: Teo Jung.
 Kunredaktoroj: J. Felik, H. Hurler, Max Butin.
 Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tutmondo.

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Germanaj abonantoj

renovigu
 tujn vian
 abonon

nur ĉe la postoficejo

Semajna Kun senpaga monata „Revo“ Neŭtrala

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoficejo.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 800 Kr.	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Litova 20 Cd	Rumana 3 Leol.
Belga 0.60 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Brita 3/4 P.	Francna 0.80 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levul	Germana 1.20 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Pola 180 Mk.	Svisa 0.20 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.80 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon ĉe sia Aboneto. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.80 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la -- -- -- -- -- abonkonto. -- -- -- -- -- Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svivan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 60 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

Numero 116 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 24. Decembro 1922.



IAM antaŭ mil-naŭcent-dudek-du jaroj la stelo de l' saguloj ekbrilis super la stalo de Bellehem, nur la gepatroj de l' Infano, kelkaj humilaj paŝtistoj kaj tri reĝoj el la Oriento staris apud Lia modesta kuŝejo. Poste Lia verko, Liaj instruoj kaj ideoj trovis entuziasmajn disĉiplojn tra la tuta mondo, kaj la Kristanismo fariĝis la plej granda kaj plej signifa religio de ĉiuj tempoj, kies forto ankoraŭ hodiaŭ estas nerompita kaj firma kiel iam ajn.

Kiam antaŭ tridek-kvin jaroj la stelo de Esperanto ekbrilis super la mondo disputanta en cent lingvoj kaj intermilitanta pro nekomprenejo kaj netoleremo, nur malmultaj pioniroj ekkonis ĝian estontan signifon kaj tuj sekvis ĝiajn radiojn. Poste la sekvantaro kreskis, kreskadis senhalte. La verko de la Majstro, lia grandioza ideo jam trovis fervorajn kaj oferemajn disĉiplojn tra la tuta mondo. Precipe de ni, samideanoj, dependas, de nia serioza kaj insista laborado, de nia fervoro kaj agemo, de nia prudento, ĉu baldaŭ la ideo de Internacia Lingvo venkos en ĉiuj terpartoj, en ĉiuj sferoj de la homa civilizo.

Hodiaŭ, je Kristnasko, memorante pri la stelo de Bellehem, ni ne forgesu nian Esperantan stelon, kiun ni ĉiam portu kun fero, sed kiun porti ni ankaŭ montru nin indaj, zorgante, ke ni estas veraj, bonaj Esperantistoj, kiuj unuflanke klopodas ĉiam pli perfekte ellerni nian lingvon kaj aliflanke konscias pri la alta misio, kiun ni estas prienportantaj. Kulturo, kio estas Esperanto. Mirindan taskon ni plenumas. Tiu konscio estu nia plej granda festoĝojo je Kristnasko, super-radiana ĉiujn aliajn.

T. J.

Sur la vojo al koncentriĝo.

„Internacia Komerca Revuo“ aperos de nun kiel monata komerca gazeto de ET, sub nova titolo „Internacia Komerco“.

Bonan kristnaskan sciigon ni povas raporti al niaj legantoj: Ĝis finiĝis intertraktadoj inter ET kaj la redaktisto de „Internacia Komerca Revuo“, laŭ kiuj la bonega revuo de s-o Unger komence de la nova jaro aperos sub nova titolo „Internacia Komerco“ en granda ĵurnala formato kiel monata

Kristnaskovespero.
 de Lode Baeckelmans.

Kaj veninte en la domon ili vidis la knabeton kun Maria, lia patrino, kaj kliniĝinte ili riverencis al li, kaj malferminte siajn trezorojn prezentis al li donacojn, oro, kaj incensojn kaj mirhon.

Evangello laŭ S. Mateo.
 Ĉap. II.—11.

Neĝado ĉesis, kaj la stratoj purblanke brilis sub la reheliginta ĉielo plena de steloj ĉirkaŭ la luno lumanta.

Vento pikanta suprenpelis la polvan sablon briletantan, siblis tra la telefonretoj, blovis super la tegmentoj. Ne estis alia bruoj en la strapga vespero.

Du homoj solece iris tra la stratoj. Ili renkontis unu la alian en drinkejo, la finna maristo kaj la juna poeto. La Finno, multepeza fortikulo, marŝis balancigante apud la vigla, blonda, aventur-ema junulo. Kristnaskotrinkaĵo kaj iom da haven-angla lingvaĵo kunigis ilin. Estis pli agrable vagi kune en la ŝipista kvartalo, kvankam la vortoj estis maloftaj kaj nekompletaj.

En la Paulostrato ili haltis antaŭ la pordo de trinkejo. Sur la fenestro ili legis la surskribaĵon: „Trokadero“. Sonoris la dekunua sur la turo.

„Ĉi tie?“ demandis la Finno.

„Ĉarmaj knabinoj“, diris la Poeto.

La „Trokadero“ ne similis al vasta palaco! Starigita ĉe la stratangulo, la domo estis malvaste konstruita ĉe la malantaŭa flanko de la policejo. La trinkejo estis granda kiel antaŭtuko, bufedo kaj du tabloj apenaŭ lasis lokon por la gastoj. La forneto zumeĝis kaj la gaslumo

komerca gazeto de ET. Redaktisto restos la specialista en sia fako s-o Unger. La malnovaj abonintoj de „Internacia Komerca Revuo“, kies abono ankoraŭ ne finiĝis, ricevos anstataŭe „Internacian Komercon“.

Per tiu kunfando gajnos ET kaj la „Internacia Komerca Revuo“ kaj entute nia movado, precipe la fake komerca Esp. movado. ET konsiderinde pligraviĝos, ĉar la monata speciala komerca numero estos nepre serioza, severe laŭfaka laŭ aranĝo kaj enhavo. Por tio jam garantias la nomo de la redaktisto. „Internacia Komerca Revuo“ gajnos, ĉar de nun ĝi aperos — en la nova formo — regule ĉiumonate. Samtempe profitos per tio nia movado kaj precipe la fake komerca movado, ĉar de nun ĝi havos regule aperantan organon, kiu cetere ne estos legata nur de kelkcent abonantoj sed de ĉiuj legantoj de ET; do ankaŭ anoncoj en ĝi havos pli grandan efikon, kaj la intereso por Esperanto per tio certe kreskos ĉe komerc kaj industrio.

La koncentriĝo de la plej seriozaj Internaciaj Esp. gazetoj (krom „Esperanto“ de UEA kaj la organo de SAT, kiu pro sia speciala tendenco estas ekster nia konsidero ĉe la pritraktata temo) estas tiom pli signifa, ĉar ni staras antaŭ la Internacia Komerca Konferenco en Venezia, kiu — por paroli kun D-ro Privat — „povos havi sekvojn eĉ multe pli gravajn ol ia rekomendo de la Ligo de Nacioj“.

„Internacia Komerco“ aperos provizore kiel kompleta kvina (resp. sesa) numero de ET en la monato, kune kun la monata „Revo“. Krom al la abonantoj de ET, ni intencas regule ekspedi ĝin propagandacele al ĉiuj gravaj komercaj ĉambroj kaj al multaj komercaj, industriaj kaj turismaj firmoj kaj unuigol, se niaj rimedoj tion permesos.

Per tiu aranĝo nia projekto, publikigita en n-o 113, jam estas ŝanĝita. Sed ĉiu projekto ja estas variebla antaŭ sia realigo. Ni ne supozis, eĉ ne esperis, ke nia voko al koncentriĝo sekvigis tiel baldaŭan ekzemplon.

Ni pripensas trankvile la pluan evoluigon de ET kaj ĝustatempe scigos niajn legantojn pri eventualaj aliaj modifoj de nia projekto.

gaje brilis. La Poeto metis branĉeton da mimozoj kaj fasketon da violoj sur la blankan marmoran tablosupraĵon. La florojn li acetis hieraŭ vespere de florvendistino kun dolĉaj okuloj. La Finno ekbruligis malhelan cigaron kaj mendis du glasojn da „stout“ al la komplezema servistino en bluzo ruĝa.

Gajeme la brunhara Ida staris malantaŭ la bufedo kaj parolis pri bagatelaj kaj plaĉaj aferoj. Ŝi parolis anglan lingvon, miksite kun brusela ŝerco.

„Bela kristnaskovespero“, ŝi diris, „neniu homo en la strato Malbone por la aferoj“.

„Nu jes“, respondis la Finno.

„Estas belege ekstere“, rimarkigis la Poeto, „belega blanka kristnaskonokto; la urbo estas senbrua, blankoplana kaj argentoluma.“

„Jes“, kaptis la Finno, kiu komprenis nenium vorton, ĉar la Poeto nun parolis flandre.

„Kun kia stranga homo vi estas nun?“ demandis Ida.

„Poeto de la finnaj lagoj fama homo el la Nordo!“

„Bah! Poetoj ne havas monon“, malestime diris Ida.

„Ne ofendu nin; aminda virino!“

„Serculo!“

„Sailor?“

„Yes, miss Ida!“

Ŝi verŝis por si mem glaseton da likvoro kaj venis ekŝi apud la maristo, sen komplimentoj, ĉar tiel konvenis.

„Ĉu vi faris longan vojaĝon?“

„Yes!“

„Apenaŭ maldungita?“

„Yes!“

„Kia estas via nomo darling?“

„Melhioro!“

Esperanto — la „ilo“, la „nurano“ kaj la verda stelo.

En sia responda artikolo „Parolu, jes parolu“ en n-o 111 de ET la verkinto pridubas, ke mi pritraktis la aferon „laŭ ĝusteca kaj justeca vidpunkto.“ Certe, se mi rigardas Esperanton tra la okulvitroj de l' „fantomo“ aperiganta en la koncerna artikolo, se mi alproprigas al mi la pensmanieron de multaj aliaj interesantoj — mi estis tute malprava, tute maljusta; ĉar unu aferon mi forgesis, unu eron de Esperanto mi ne priatentis: Esperanto estas ja nur „ilo“. Ilo, kiu donas aŭ donos rimarkindan utilon, personan utilon en plej diversaj okazoj; ilo por estiĝi aŭ plibonigi privatajn komercajn rilatojn; ilo por gajni monon instruante Esperanton post ĝia ĝenerala enkonduko, ilo por gajni monon kolektante respond-kuponojn sen intenco iam ajn respondi; ilo, por malkare vojaĝi helpe de afablaj samideanoj, ilo por senkoste ekhavi gravajn bezonatajn aŭ deziratajn sciigojn, kiujn la „delegitoj“ afable peras; ilo por kontentigi onian kolektemon kaj ŝanĝemon, ilo por travivi agrablajn horojn kaj por bone amuziĝi en la rondo de afablaj samideanaj amikoj, entute: Esperanto estas profitdona afero. Kaj kompreneble, ĝis kiam Esperanto ne donas ĉi tiun profiton, ne havas ĉi tiun personan utilon, ĝis tiam ĝi ankoraŭ ne interesas certajn homojn „bazantajn sur realaĵoj“; ĝis tiam nia movado estas al li senvalora entrepreno. Aŭ maksimume, ili atendas kaj spionas ĝis venas la momento, kiam la stato de nia movado estas pli favora al iliaj egoistaj celoj, kiam ili povas praktike uzi la servojn de Esperanto.

Samideanoj! Ĉu vi mem ne lomete kaŭzis kaj eĉ firmigas tian pensmanieron? Vi ja ĉiuokaze proklamas kaj enmartelas en la kapojn: Esperanto estas neniel celo, Esperanto estas nur ilo. Ĉu vi do rajtas plendi pri nekomprenejo kaj indiferenteco, se oni ne interesiĝas por la ilo, ĉar oni ne bezonas tian? Ĉu vi rajtas riproĉi la profitemulojn, se ili atendante kaj atente apudestaras, ĉar por ili ne jam ekzistas praktika uzebleco kaj apliko de la „ilo“?

Esperanto estas nur ilo. Do ne plu paroli pri niaj „ideoj“, pri niaj „altaj celoj por la bono de l' homaro“, ĉesu paroli eĉ pri la „movado“. Pro kio ni „movadas“, por kio ni batalas? Esperanto

estas ja nur ilo! Kian intereson ni havas disvastigi ĉi tiun ilon kaj ĝenerale konatigi ĝin? Povas ja esti indiferente al ni, ĉu ankaŭ aliaj konas kaj aplikas la ilon, kontraŭe, eble estus pli avantaĝe rezervi la ilon al ekskluzive propra, persona uzado.

Ne komprenu min malĝuste. Certe, Esperanto povas esti profitdona afero, certe ĝi jam ofte pruvis sian utilecon kaj taŭgecon en diversaj aferoj, certe ni rajtas atentigi pri la atingitaj per ĝi sukcesoj kaj pri la gravaj servoj en sen nombraj okazoj. Sed tamen mi opinias: Ni ne tro akcentu ĉiuokaze ĉi tiun ilecan karakteron de Esperanto.

Estas ja vere, Esperanto estas „ilo“, la ilo por la internacia interkompreniĝo, ilo por la spirita alproksimiĝo de la per lingvaj baroj disigitaj popoloj, ilo kreita en ĉi tiu nobla intenco por la bono de l' homaro de nia malegoista, homama Majstro.

Ĉi tiun flankon de Esperanto ni ne forgesu jen, pro kio ni movadas, por kio ni batalas, jen la celo, jen kion ni penas atingi per ĉiuj fortoj: Konatigi, enradikigi, disvastigi, firmigi, daŭrigi Esperanton, en tia nobla senco vera ilo por „unigi la homaron en unu granda rondo familia“. Sed por tio ni bezonas seriozajn, sindonemajn pionirojn kun „forta kredo, firmega konfido“ kiuj energie, ne aspirante personan profiton, senlace laboras, ofertas tempon kaj monon, kiuj prenas sur sin la nedankan taskon, „kontraŭstarl la amasegon de antaŭluĝoj kaj malamikaĵoj“ de malprogresemuloj kaj indiferentuloj. Kaj por tio ni bezonas perfektajn Esperantistojn, kiuj per propra apliko pruvos la taŭgecon kaj uzeblecon de nia mondhelpingvo.

Se vi verbas kaj propagandas por Esperanto inter via konataro, diru ĉiuokaze la veron pri la stato de nia movado. Penu ekkoni la inklinojn de l' varbotaj; vi baldaŭ eltrovos, ĉu ili ankoraŭ havas ideojn aŭ ĉu ili bazas sur realaĵoj aŭ ĉu ili aspiras ekskluzive personan profiton. Do diru al la idealistoj, ke ni nepre bezonas pionirojn por antaŭenpuŝi nian aferon, kaj ni eble baldaŭ vidos ilin en niaj vicoj kiel fervorajn kombatantulojn, kiel verajn Esperantistojn. La realistojn kaj profitemulojn atentigu, kiel maljuste kaj malĝuste ili pensas kaj agas. Maljuste, ĉar ili mem ne volas fari ion, ili volas atendi, ĝis kiam aliaj plugadis la kampon por poste, en la tagoj de rikolto, alveni kaj — gratulante pro la admirindaj sukcesoj — rikolti la fruktojn el la pena laboro de malgranda aro de l' „naivaj“ idealistoj; malĝuste, ĉar ili ne pripensas, ke ili

„Kiel vi renkontis unu la alian?“

„Renkontis amikon en trinkejo promenante kune!“

„Prosit!“

„Prosit!“

La Poeto revante rigardis la ĥinajn ventumilojn ĉe la muro kaj poste sian krudan konatulon, kiu malterte amindumis la gajan servistineton.

Grumblante aperis Baltazaro, la armena tapiŝvendisto, ĵetis senzorge sian paketon teren, mendis glason da limonado, dum li alŝovis sian seĝon apud la forneton. Li tremis en sia dika vintrovesto, ŝovis sian turkan ĉapeton en la kolon, gratis la korvonigrajn harojn.

Liaj malhelaj okuloj brilis en la bruna osta vizaĝo.

„Malbona vetero“, li soptris, „no people... no business.“

Li ne klopodis rekomendi siajn tapiŝetojn. Ili kuŝis apud li, multkoloraj figuretoj sur griza fono, tra kiu oraj fadenoj ĉie trapasis. Malvarmiginte li frotis siajn ŝuojn ĉirkaŭvolvitajn per bluaĵ tukopecoj, kiuj elŝoviĝis el lia vinruĝa, mallonga turkapantalono.

„Estas malvarma vetero“, asertis la Finno.

„Tre malbona vetero“, jesis la Armeno, „no business...“

Ida duonkantis gajan francan kanteton. Tiam venis Paŭlino, la dika blonda trinkejestrino, el la ĉambreto super la kelo.

„Abend“, ŝi kriis sur la ŝtupareto.

„Abend, Paŭlino!“

„Ho, jen estas Gaspardo, la poeto!... Bona Dio, kiel longtempe vi forestis. Kaj Baltazaro tie sidas tiel trankvile...“

„No business...“

„Ne, keire Geschaette!“ Ĉu ankoraŭ neĝas?“

„Ne Paŭlino, sed la stratoj estas virge blankaj...“

„Nu jes virge...“

„Mi prezentas al vi mian amikon Melhioron, la plej faman poeton el Finnlando; mi konatigis kun li en suspektinda akompano je dudek-tri minutoj post la oka apud la Karborivereto!“

„Schwaermer!“

„Tiaj estas ja la poetoj, altestimata Paŭlino!... Ĉu ni nun ne trinku agrablan punĉon en la malantaŭa ĉambro?...“

„Punĉon, jes, punĉon“, soptris la Finno.

„Tio ne estas ebla hodiaŭ“, decide diris Paŭlino.

„Ne, ne en la malantaŭa ĉambro“, certigis ankaŭ Ida.

„Estas tiel agrable tie“, insistis la Poeto.

„Estas tute ne eble...“

„Kial ne?...“

„Naskiĝis tie infano“, flustris Paŭlino, „anĝela infano.“

„Tie en la ĉambro?“ demandis la Finno.

„Jes!...“

„Infano“, malrapide diris la Poeto, „infano? Al kiu apartenas tiu infano?“

„Al mia fratino Mario ŝi kuŝas sur la kanapo, kaj la lulileto staras apud ŝi.“

„Estas sana knabo“, memkontente diris Ida, „Paŭlino kaj mi faris ĉion sen kuracisto kaj akusistino.“

„Nun ili dormas“, rakontis Paŭlino, karese kaj patrine; „mia malfeliĉa fratinejo... ankoraŭ tiel juna kaj jam en zorgoj se mi estus havanta tiun infanon...“

„Aŭ mi“, diris Ida, „sed ŝi mem estas ankoraŭ infano!“

„Kiam ŝi skribis al mi, ŝi estis senespera. Estis neeble sciigi pri tio la gepatrojn, ili estas tiel honestaj, ili ne scias, ke mi havas ĉi

atendus ĝis la mondflno, se ĉiuj pensas kaj agas kiel ili mem, se ĉiu volus nur rikolti kaj nenlu zorgi pri la semado.

Permesu, ke mi diru plian vorton pri la „nuranjo“, kiel mi imagas tian kaj kies tipo estas priskribita en la supre citita artikolo de Jobo. Jen homo, kiu okupas sin pri ĉiuj eblaj aferoj, pri politiko, scienco, arto, muziko, sporto, literaturo, kulturo, komerco, tekniko, ekonomio ktp., kiu estas membro de cent asocioj, societoj, unuigoj, kluboj kaj rondoj, membro de urba kaj — mi ne scias kiamaj aliaj konsilantaroj, sed kiu nenie kunlaboras serioze, fervore kaj energie, ĉie nur supraj kaj por brilligi sian personon kaj nomon. Nu, eble ĵus fondiĝis Esp. grupo en lia urbo. Ĉar li ja estas „viro de la publika vivo“ — jen nova okazo por brilli antaŭ la publiko kaj Esperanto estas jam sufiĉe grava kaj rimarkinda afero, do estas kvazaŭ devo por klera kaj progresema homo aliĝi. Kaj li fariĝos „Esperantisto“, estas entuziasmigita pri la „ideo“, mirigita pri la facileco de la lingvo, kaj baldaŭ sur ĉiuj muroj kaj afiŝoj frapas la okulojn de l' pasantoj la vorto „Esperanto“ kaj la propagandaj ŝildetoj: „Lernu Esperanton“. Ho, se la legantoj sciis, ke la lingva scipovo de l' apostolo konsistas el la frazetoj: „Bonan tagon“ kaj „Ĝis revido!“ Kaj la Esperantistoj estas ja tiel afablaj homoj, estas ja fine indiferente, ĉu oni pasigas la tempon en kegloklubo aŭ en Esp. kunveno, se ĉefe oni bone amuziĝas. Kaj certe oni faras bonan impreson per la verda stelo, kiun oni flere portas; oni certe imponas per la fanfarona proklamo: „Mi estas Esperantisto“. Kaj demandite pri la signifo de l' stelo li miras: „Kiel, vi ankoraŭ ne scias ion pri Esperanto? Ne kredeble! Kiel klera homo vi ankoraŭ ne estas Esperantisto? Estas urĝa tempo, ke vi fariĝas tia. Ĉu nia afero prosperas? Ho sendube! La infanoj en la lernejo jam lernas Esperanton, en ĉiuj oficejoj kaj negocejoj ĝi estas uzata; komerco, industrio, la tuta publika vivo ne plu estas imagebla sen Esperanto, kiel, ĝi estas malfacila! Kontraŭe, facilega ĝi estas, ridinde facila, jen lernlibro, tralegu ĝin kaj jam post 3 ĝis 4 tagoj vi komprenos ĉiun Esperanto-tekston. Kiom da anoj nia unuigo havas, vi demandas? Cetero „grupo“, mia Karulo, Esperanto-„grupo“, ne simpla unuigo! Ho, aliĝis la urbestro, la pastro, la instruistaro, preskaŭ ĉiuj komercistoj, la poŝtaj-kaj fervojaj oficistoj, mal-longe: la tuta intelektularo de nia urbo. Kaj oni konatiĝas kun la tuta mondo per korespondo, jen — vidaĵoj senditaj al mi el la plej malproksimaj anguloj de l' terglobo.“

Sed en tia „propagando“ konsistas la tuta agado de tia fanfaronemulo por nia afero; li nek scipovas la lingvon nek profunde enpenetris en la esencan de nia movado. Kaj pro tio tre baldaŭ estingiĝis la pajlofajreto, ĉar li konvinkiĝas, ke Esperanto ne jam estas tiel grava, kiel li opiniis; krome li ne plu havas tempon, ĉar aliaj novaj „gravaj“ aferoj okupas lin pli intense; tamen li restas „fidela“ ano de nia movado (kia honoro!) kaj eble pli poste, kiam la cirkonstancoj fariĝas pli favoraj, li certe pli fervore ekagos.

Ĉu tiaj „samideanoj“, nek varmaj nek malvarmaj, estas seriozaj, sinceraj, sindonemaj pioniroj, celkonsciaj Esperantistoj? Ĉu ili povas helpi nin antaŭenpuŝi nian aferon? Kian utilon ili havas por nia movado? Ĉu ili estas lo alia ol „nuranjo“ kaj sencelaj „kunkuruloj“? Pro kio ili sentas sin „insultitaj“ pri ĉi tiu atributo?

Sed mi estu justa. Certe ekzistas ankaŭ sinceraj „nuranjoj“, al kiuj ni eĉ ŝuldas grandan dankon: homoj, tro okupataj per profesiaj kaj aliaj aferoj, kiuj vere ne havas tempon por elfunde ellerni la lingvon aŭ aktive labori en nia movado; progresemaj homoj, konvinkitaj pri la graveco de Esperanto, kiuj subtenas nin per monrimedoj, rekomendoj, defendoj de nia ideo, kiuj propagandas ĉiokaze laŭ sia maniero kaj povo.

tie trinkejon... Ili pensas, ke mi estas guvernistino. Mi invitis ŝin viziti min... Kiam ŝi estis ĉi tie, mi skribis al la patrino, ke Mario devos resti iom por anstataŭi min, ĉar mi, post grava malsano, bezonas ripozon kaj kuraĝigon. La fianĉo de Mario servas en la armeo... Ili baldaŭ edziĝos, kiam finiĝos lia soldateco, kaj tiam ili povos konfesi ĉion... La infaneto restos ĉi tie sed ŝi post nelonge reveturos... La infanon mi edukigos en la kamparo!...“

„Romano“, kortsuŝite diris kun rido la poeto. „Ne romano“, nels Paŭlino, „la ĉiutaga vivo...“

„Mario estas sensperta, brava knabino“ revis Ida.

„Tio estas knabo“, rekomencis Paŭlino, „li multe similas al sia patro se oni povas juĝi laŭ la portreto.“

„Ĉu ni povas vidi la infanon?“ tiameme demandis la finno.

„Ne, ne!“

„Nu, Paŭlino, lasu nin vidi la infanon“, petis ankaŭ la poeto.

„Sed ili dormas!“

„Ni estos tute senbrujaj... nur iomete rigardi“, insistis la poeto.

„Venu do“, diris hezite Paŭlino, „sed ne forgesu, ke infano naskiĝis.“

Ili iris al la malantaŭa ĉambro trans la ŝtuperojn... Paŭlino kaj Ida antaŭe, la peza finno kaj la altkreska poeto malantaŭe.

Lampeto radis sub la papera ŝirmilo, kaj ombro estis en la anguloj. Sur kanapo kuŝis la juna patrino, pala en la ornamajo de siaj malligitaj, blondaj haroj... Apud ŝi staris la salika lullieto, en kiu kuŝis la infaneto, roza misteraĵo meze de blanka tolaĵo... Ili retenis la spiradon kaj rigardis al la patrino kaj al la infano.

Ĉi tiujn amikojn de Esperanto ni ŝatu; ili estas pli valoraj ol malseriozaj stelportantoj, por kiuj la stelo estas nenio ol ornamajo por la butonturo.

La verda stelo! Kion ĝi signifas? Certe, ĝi estas propagandilo, ĝi frapu la publikon kaj atentigu ĝin pri nia afero. Sed ĝi ne trompu! La ĉefa tasko de l' stelo, laŭ mia opinio, estas, ke ĝi montru: Jen homo, kiu scias nian lingvon, kun kiu mi povas interparoli Esperante, kun kiu mi — estante eble en fremda lando — povas interkompreniĝi. Sed bedaŭrinde, ĉi tiurilate la stelo ofte trompas: Tro ja ne estas Esperantistoj, ili ja ruĝiĝas, kiam oni ekparolas al ili, ili embarasiĝas kaj diras en flua Esperanto: „Mi estas novulo, mi estas komencanto“; en „flua Esperanto“, ĉar per kelkajra apliko ili fine atingis admirindan lertecon en la uzado de ĉi tiu frazo. Mi memorigas la leteron de anglo, kiu plendis en ET pri ĉi tiu afero okaze de sia vizito de la Leipziga foiro. Sen-sukcese li estis ekparolinta al tri, kvar stelportantoj, „komencantoj“ kompreneble, fine li trovis helpon ĉe samideano, kiu ne surhavis stelon. Kaj la anglo demandas, ĉu ĉi tiu sinjoro eble hontis surmeti sian stelon, kvazaŭ la stelo estus ne plu

pri specialarango la kotizoj estas fiksitaj por Bulgaroj je 60 levoj, por Rumanoj je 60 lej, por Estlandanoj je 150 Emk., por Jugoslavoj je 50 dinaroj, por Latvoj je 150 laivaj rubloj, por Litovoj je 10 litoj.

Aliĝiloj. La aliĝiloj, ĉ. 8000 ekzempleroj, estas dissenditaj meze de novembro, pere de la Esperanto-Gazetaro kaj de la delegitoj de UEA. Kiu ne ricevis aŭ ricevos tiamaniere aliĝilon, bonvolu peti ĝin rekte de la LKK.

Aliĝoj. Aliĝis ĝis la 15-a de decembro pli ol 800 personoj el 17 landoj: Armenujo, Aŭstrujo, Belujo, Bulgarujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Eŝlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Polujo, Rusujo.

La publikigo de la listo okazos en nia oficiala informilo Esperanto Triumfonta, kiu represos iom post iom la nomojn de la partoprenantoj.

Kongreskarto. Nia oficiala kongreskarto, desegnita kaj dediĉita de nia komitatano s-o Heinrich Nass estas sendpreta. Por kiel eble plej multe ŝpari, ĝi estos dissendata senpere nur al

natojn en granda teatro aŭ kino. Oni konigu al ni la dimensiojn de la bezonata klišo.

Gazetaro. Estas dezirinde, ke jam nun la Esperantaj kaj naciaj gazetoj ĉiulandaj atentigu pri nia XV-a. Por tiu ĉi celo ni rekomendas la uzadon de la Nürnberg specialnumero de Esperanto Triumfonta, kiu ja enhavas sufiĉe da interesa materialo. Ĉiujn koncernajn gazetojn, resp. eltranĉaĵojn oni bonvolu sendi al la LKK.

Fakkunsidoj. Pluajn fakkunsidojn, anoncis: Por fervojistoj: s-o sekretario O. Schlicht, adreso: Esperanto Nürnberg.

Por virinoj: s-ino Signe Wollter-Pfister, Nürnberg, Baderstr. 17.

Por oficistoj: s-o Adolfo Oberrotman, Delegito de UEA Warszawa.

Por scienculoj: ISA (Atentu la apartan cirkuleron de ISA).

Kongresarangoj. Krom aliaj grandataj arangoj estas projektataj internaciaj recitadmatineo, popoldanca revuo kaj piedpilkturniro. Nepra antaŭkondiĉo estas sufiĉa partoprenado. Pro certigo de la arangoj ni petas kiel eble plej baldaŭajn sciigojn.

Korespondado. Alvenis al ni lasttempe multaj ne aŭ nesufiĉe afrankitaj privataletoj, kiuj kaŭzis multe da elspezoj al la Kongresa Kaso. Ni petas insiste atenti pro tio; alie ni ne povus akcepti nek respondi.

Loka Kongresa Komitato
Por eviti konfuzojn, oni adreso
nur: Esperanto, Nürnberg.

ISA.

Laŭ interkonsento kun la diversaj estraroj ni publikigas la jenon:

- Dum la venonta kongreso okazos:
- unu laborkunsido de la estraro, delegitoj kaj sekciestroj de ISA.
 - unu ĉefkunveno de ISA.
 - po unu kunsido de Int. tekn. asocio, pedagogia, jura, biologia, kemi-fizika sekcioj.
 - du kunsidoj de TEKA.

La kunvenoj estos fiksitaj je malsamaj tempoj, tiel ke ĉiu ISA-ano povos viziti ĉiujn.

Dum la kongreso je destinitaj horoj samideano deĵoros en la akceptejoj, por doni informojn kaj akcepti aliĝojn.

Ĉiu ano, kiu deziras fari sciencan paroladon en la sekcio, bonvolu baldaŭ komuniki al la LKK la temon kaj daŭron de la parolado.

Ĉiujn alispecajn dezirojn kaj proponojn ĉiuj sekcioj direktu al la unu sama adreso, t. e. Esperanto Nürnberg, al D-ro Kleider.

Skolta Esperantista Ligo.

En „Jamboree“ n-o 8 (Internacia Skolt-jurnalo publikigita de la internacia fako de la Brita Skolta movado kaj verkita en franca kaj angla lingvoj) la Skolta ĉefulo skribas pri la korespondado inter la skoltaro de la mondo kaj mencias la neceson de komuna neŭtrala interkomunikilo. Li favore mencias Esperanton, sed pli favoras latinan lingvon. Ke li skribas tiel pri Esperanto, estas bona signo, kaj ni esperas, ke fine li venos al la konkludo, ke nur Esperanto solvos la problemon.

La Skolta Esperantista Ligo jam de sufiĉe longe konstatis la bonan efikon, kiun havas la interkorespondado, tial ĝi starigis korespondadan fakon por siaj anoj.

S. E. L. tamen ankaŭ konvinkiĝas, ke eĉ pli efika estas la kunvenado kaj nun ekarango internacian tendaron, kiu okazos prokelman someron, eble en Belgio. Se tiu tendaro estos sukcesa, kiel ĝi sendube estos, S. E. L. starigos ĉiujarajn tendarojn, kiuj okazos en aliaj landoj. Tiu tendaro estos unika okazintaĵo en la historio



D-ro Privat en Lyon okaze de sia propaganda vojaĝo tra Francujo.
(L'gu la koncernan raporton en n-o 114.)

De maldekstre dekstren: sidante: f-ino Cherblanc; s-o Privat; s-ino Farges, delegitino de UEA en Lyon; starante mal-supre: s-o Beaumes, vicdel. de UEA en Tarare; s-o Sinpak; s-o Ling; s-o prof. Antonelli, prez. de la grupo en Lyon; s-o Sun; starante supre: s-o Revnier; s-o Poncet.

la insigno de Esperantistoj, sed de ridindaj arlekenoj. Certe, tiaj „kunbatalantoj“ ridindigas nin kaj nian movadon. Mi ne kuraĝas decidi la demandon, ĉu estas dezirinde vidigi plejeble multajn stelojn, ĉu la eta propagando valoras kaj kompensas la eblan malutilon, kiun kaŭzas certaj fanfaronemaj, malseriozaj stelportantoj; eble plispartuloj esprimos sian opinion en ET pri ĉi tiu afero. La afero estas ja malpli grava, sed ankaŭ mi ripetas: „preferinde estas havi malamikon ol mal-spritan amikon.“

Mallerta.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto

en Nürnberg.

3-a Cirkulero.

Kongreskotizoj. Konsiderante la nunan malplivalorigon de la germana marko, ni estas bedaŭre devigitaj plialtigi la kotizon por Germanoj, Aŭstroj, Poloj kaj Rusoj, deponitaj la 1-a de januaro, de 200 gmk. al 1000 gmk. Pluajn plialtigojn, laŭ la cirkonstancoj, ni devas rezervi al ni. Laŭ petoj

eksterlandanoj, kiuj bezonas ĝin supozeble por la pasvizo. Germanoj ricevos ĝin kune kun per la delegitoj de UEA.

Financoj. Por la Kongresa Kaso ni jam ricevis multajn donacojn, kiujn ni danke kvitancas, same por la Garantita Kapitalo, kaj la Blindula Kaso.

La nomojn ni publikigos laŭvice kaj laŭ la disponebla loko.

Envojaĝpermeso. Eksterlandaj gazetrportoj pri envojaĝaj malfaciligoj, speciale flanke de la bavara registaro estigis malrankvilon ĉe multaj samideanoj. Kiel ni jam akcentis en nia 2-a cirkulero, ĉi tiuj malfaciligoj ne koncernas la partoprenantojn je nia XV-a Universala Kongreso.

Lumbilda propagando. Farinte bonajn spertojn koncerne lumbildan rek'amon, ni disponigos al ĉiu granda urbo senpage efikan vitran klišon, kiu montras la silueton de Nürnberg, la verdan stelon kaj la ĉie kompreneblan tekston: XV-a Universala Kongreso de Esperanto, 2.—8. de aŭgusto 1923, Nürnberg.

La mendontoj devas garanti, ke ili montrigos la klišon je siaj propraj kostoj minimume 3 mo-

Paŭlino estis malkorkinta botelon, verŝis ŝaŭmvinon en la glasojn.

„Por la knabo“, tostis la finno.

„Por la patrino“, diris la armeno. Per unu fojo la glasoj estis malplenigataj.

„Nun ni foriros“, diris la poeto.

Baltazaro butonumis sian veston kaj reprezentis siajn tapiŝojn. Melhoro ekbruligis novan cigaron, dum la poeto jam estis malferrinta la pordon.

Ekstere ĉiu iris sian propran vojon post mal-longa saluto.

Ili iris en malsamajn direktojn sur la neĝo, tra la vento akra, sub la lulumo, kiu malsupren raditis el la klara stelĉielo.

La poeto malrapide vagetis tra la blua blanko, kiu brilante ĉie kuŝis. Li ne sentis malvarmon, aŭ la pikadon de la vento, li vidis ĉion pura kaj blanke kovrita per argentlumo. Li pensis pri la infano, kiu naskiĝis en la malantaŭa ĉambro de la trinkejo, pri la sensperta patrino, pri la brilantaj virin-okuloj kaj pri la fremdujoj kaj ilia honoraprobo al la vivo.

Kun afabla permeso de l' aŭtoro el la franca lingvo tradukis Jan Van Schoor.

La rajto pri traduko en aliajn lingvojn estas rezervita al la aŭtoro. Por tiu celo oni povas sin turni al la adreso de „Belga Esperantisto“, Kleine Beerstr. 45, Anwerpen.

AL ĈIUIJ NIAJ ABONANTOJ KAJ ANONCANTOJ NI DEZIRAS FELIĈAJN FESTOTAGOJN KRISTNASKAJNI

Subite kantis la haveno. La vaporŝipoj grumbliis kaj falfegis, stranga bruega muzikaĉo, harmonika ludo kaj voĉoj rebrulis el la silento.

„Happy Christmas!“ ...

Kristnaska fabelo.

De Tiberio Morariu.

Petolemaj anĝeletoj bonhumore amuzas sin, neĝpilkojn ĵetante unu al alia. La kunpuŝiĝintaj pilkoj eksplodas, el ili centoj da neĝeroj disflugas

ĉiudirekten, kaj poste la flocko dance-

balance flugas malsupren, sur la teron.

Subite ekbrilas ora stelaro, kaj la anĝeloj tul ĉesas ludi, obeante la stelsignitan ordonon de l' Sinjoro; iliaj okuloj apenaŭ povas rigardi la Plejperfektulon, majeste sidantan sur brilega, stela trono. Dio mildvoĉe ekparolas al antaŭ li staranta kulpa spirito:

„Hodiaŭ estas kristnasko, festo de l' paco, bonvolo, bonfarmo. Laŭkutime tiuvespere mi liberigas unu kulpon el la puriga fairo, — nun mi vin igis libera, flugu surteren por fari bonon al la tle vivantoj; se vi trifojje bonfaros al ili, — eĉ se eble per tio vi suferos — vi puriĝos kaj vi ricevos lokon apud mi, inter miaj bonaj anĝeloj. Mi donas al vi povon, por estiĝi surtere tiuforma aĵo, kiun vi elektos. Iru do pace kaj agu bone!“ ...

La kulpa spirito jam de longe flugadas super la tero, forlasante mejlon post mejlo, sed ĝi vidas ĉie nur senfinan neĝkovrilon, ĉiam la saman, vastan, blindigan blankecon. Ho! Fine io nigra.

• SUDGERMANA ESPERANTO-ELDONEJO •
OSKAR ZIEGLER, DEISENHOFEN B. MÜNCHEN

liveras krom
propra eldonejo,
tuj ĉiujn aliajn Esperant-
aĵojn je plej bonaj
kondiĉoj.

POSTULU PREZPROPOŬOJN!

Pola Esperanta Komerc

Włodzimierz Wojciechowicz & K-nio
Agentejo „P.E.K.A.”
Łódź, Kilin-
skiego 99,
Pollando

Plenumas ĉiujn servojn por industrio kaj komerco.
★ Perado ★ Informoj ★ Reklamo ★ Re prezentado ★

E K S P O R T O Filioj kaj agen-
turoj en ĉiuj gra-
vav polaj urboj.
I M P O R T O Papero, skribmaterialo,
galanteriaĵoj, maŝinaj k-
ĉiuj artikoloj por industrio.

PEKA estas fondita en la plej grava centro de pola komerco
kaj industrio (ĉirkaŭ 1000 fabrikoj, pli ol 500 000
da loĝantoj) por pruvi per aplikado en komerca vivo
la praktikan taŭgecon de Esperanto, kaj tial

PEKA atendas plej favoran subtenon de ĉiuj Esperantoj,
aŭ uzantaj Esperanton kiel helpilovon, komercaj
institutoj, organizaĵoj kaj apartaj E-toj.

PEKA turnas sin al ĉiuj eksterlandaj kaj enlandaj komercaj
oficejoj, agentejoj, bankoj, komercaj ĉambroj kaj al
komercistoj kun la peto senprokraste sendi al ĝi
siajn katalogojn, prezentojn, ofertojn, specimenojn,
kondiĉojn de komercaj servoj ktp.

PEKA petas, ke ankaŭ ĉiuj Esperantistoj, povantaj en okazo
de bezono doni informojn pri siaj eldonejoj kaj
importejoj, pri lokaj aĉetbezonoj, komercaj rilatoj,
kredita kapableco de komercistoj, aŭ peradi en reklama
fako, akcepti aĉet- aŭ vendreprezentadon, tuj sendu
al ni siajn adresojn kaj kondiĉojn.

PEKA insiste petas ĉiujn Esperantistojn komercajn gazetojn
kaj ĵurnalojn kiel ankaŭ ĉiujn eldonejojn de presaj
Esperantoj, precipe enhavantaj komercajn anoncojn
kaj komunikojn, plej urĝe sendi al ni la specimena
numerojn. Se ni ne donos nian anoncon aŭ ne
abonos, ni tuj pagos, aŭ resendos la specimenojn.

PEKA en tuta Pollando je la plej favoraj kondiĉoj prizorgas
reklamon, dissendas ĉirkuerojn kaj komercajn komu-
nikojn, donas komercajn informojn, peras en komercaj
rilatoj, akceptas, aŭ rekomendas reprezentadon kaj
ĝenerale plenumas ĉiujn komercajn servojn.

Korespondas en ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed prefere en
Esperanto.

LA TRIUMFO DE ESPERANTO

Gramatika Praktiko
Flandra kaj franca, de L. Varendonck

Prezo: 5.15 flk. enlande
5.50 flk. eksterlande
Rabato de granda mendo.

Eldonis:
„La Tagiĝo”, Posthornstr. 14, Leideberg (Belg.)

neaktivan partoprenanton

kun kapitalo de 2000 dolaroj, 10000 svizaj frankoj,
5000 nederlandaj guldenoj, 15 milionoj da germ. mk.
aŭ same alta kapitalo en alia valuto; eventuale
kelkajn partoprenantojn kun malpli altaj sumoj.

Ni garantias rentumon kaj repagon laŭ valuto
destinita de la partoprenanto mem.

Pratoj Jung,
presistoj-eldonistoj de „Esperanto Triumfonta”,
Horrem bei Köln.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du
monatoj) kostas po du enprezoj kaj po 30 vortoj (krom unu adreso)
0.30 dol., 0.40 jeno, 0.50 flk., 1 nord. kr., 1 sil., 1 sviz. fr., 1 pes., 1 lit.
2 franc. aŭ belg. flk., 2 esk., 3 litr., 6 kč., 7 mk., 10 din., 18 lei, 18 levoj, 600 gmk.,
300 hung. kr., 1000 pmk., 5000 adstr. kr. Ĉiu povas pagi per liu aĵojn el la
nomita valuto, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5
stamp. resp. kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi
egalvalore de 2 franc. flk. Ĉe rekta abonantoj ni deprenas la pagon
egalvalore de la abonanto de aliaj ni enprezas anoncetojn
nur post antaŭpago. Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

ĈIUSPECAN TRIKAJOJN, speciale aritrikaĵojn faras blind-
ulinoj el nia Blindula Esp. Grupo. Ni petas multajn
mendojn! Adr.: Anna Filbrich, Erfurt, Wendenstr. 16,
Germanujo.

KONTRAŬ 10 fr. aŭ belg. flk. mi sendas rekomendite 100
diversajn bulgariajn poŝmarkojn (malnovajn, jubileajn
kaj militajn) korespondas germ., france, Esp. S-o
Theodor Theodoroff, telegrafisto, Pleven, Bulgario.

Sudslava Esp. Servo

celas praktike utiligi la uzadon de nia lingvo
kaj diskonigi ĝin en la landoj de Sudslavio.

Ĉefa agentejo por la vendado kaj reprezentado de
Esperantoj, precipe de Esperantoj libroj kaj la
abonejo de ĉiulandaj Esp. gazetoj kaj ĵurnaloj.

— Kuranta konto ĉe Balkana Banko Zagreb. —

Tenejo kaj vendejo de la libroj:
Konfeso de Pogačić, trad. Jozićić . . . sv. flk. 1 —
Du Sudslavaj Popolfabeloj de Tomić . . . 0 25
Kroataj Poeziaĵoj de Mavro Špicer . . . 1 —

Presata kaj baldaŭ aperos:
Krucumo de A. Drozdov, trad. N. Hohtov.

Eldonejo de la oficiala organo de sud-
slavaj Esperantistoj „Konkordo”.
Abonejo kaj vendejo de „Esperanto Triumfonta”.
Adreso:
Zagreb, Jezuitska ul. 1,
ĉe D-ro Dušan Maruzzi.

Seriozaj grafologiaj portretoj faritaj de Parizanino.

Sendu modelon de skribo: letero kvin subskribo kaj
koverto (estas preferinde sendi, se eble, kelkajn
specimenojn de sama skribo), kaj mi informos
vin pri viaj:
karaktero, kvalitoj, difektoj, kapableco,
seneco ktp., do, kredindaĵoj por la estonteco!

Por unu grafologia portreto Esperantlingva 10 franc. flk.
Atendu pacience respondon mian dum du-tri semajnoj.

G. du Prâna, 14 Av. de Rigny 14, Bry s/M.
(Seine), Francujo.

„Chwoika's Pilsner Bierstube”
Pilsen-Biertrinkejoj de Chwoika

Karlsbad (Ĉeĥoslovakio), Hauptstrasse,
Domo „Engländer”. — Renkontejoj de
la kuracgastoj kaj pasantoj.

NEDERLANDA ANONIMA SOCIËTÛ
LUKSA-PANO FABRIKOJ
ANTAŬE HENRIJ CARELS.

60 BUIIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTER- DAM.	LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHAR- WÄCHTER.)	DEN HAAG, 65 WEIMAR- STRAAT, ONI PARO- LAS ESPER- ANTON.
---	--	---



VERKEMAJ SAMIDEANOJ dezirantaj partopreni en la verk-
ado de kolektiva romano (10-12 ĉapitroj) estas petataj
sciigi siajn adresojn al: Tallinn, Estonio, post kast 6,
sub „Kolektiva romano”.

AL LA GESAMIDEANARO DE LA TUTA MONDO! Tiuj,
kiuj scias ion pri la sorto de sinjoro Erich Morgenstern,
estas petataj tuj skribi al la oficejo de la Germana Es-
peranto Asocio, Dresden-A. 1, Siruvestrasse 40.

S-o Morgenstern naskiĝis la 21. aprilo 1891 en Iŝtadi,
Erzgebirge (Sakaujo) kaj estis studento de matematikaj
lingvoj, fariĝis je komenco de la milito en la 104-a
infanteria regimento, 10-a komp. en Chemnitz/Sa. oficir-
aspiranto kaj estis kapita de Angulo je la 18. X. 1916 ĉe
„Eucourt de L'Albaye/Somme, Francujo. Estas eble, ke
li estas transportita per ŝipo Anglujen en la haveno „Le
Havre”, sed ne certe. Depost tiu tago, la kompandita
patro, persono plu aŭdis pri sia filo, kiu ankaŭ estis E-
perantisto, kaj li petas la gesamideanaron helpi al li per iu
ajn sciigo.

S-o Arthur Witham, 20 Hornby street, Burnley, Anglujo,
tre dankas ĉiujn samideanojn, kiuj helpis lin dum tri-
monata vizito en centra Eŭropo. Li esperas vidi ĉiujn
en Nürnberg la proklamajn jaron kaj tre bedaŭras, ke li
ne povas skribi al ĉiuj aparte.

Korespondo kaj Interŝanĝo.
S-o Rich. Ernst, Gördenstr. apud Grottau (Ĉeĥoslovakio),
deziras interŝanĝi poŝmarkojn, ilustr. fotografiojn kaj
fremdan monon.
S-o Alf. Sover, Nömmen, Estonio, deziras interŝanĝi poŝ-
markojn ilustr. de ĉirkaŭaj, naciajn ĵurnalojn, moner-
tojn ktp.
S-o Alfred Bel'em, S. Balesna 25, Tallinn, Estonujo, deziras
korespondi per poŝkartoj ilustr.

Granda novaĵo!

Elektra suno!
Plej oportuna varmig-
forno, pura, agrabla,
ĉiam pretaj!

Vendado per Esperanto Komercista Grupo,
Dresden-N., Hauptstrasse 38.
„Speton”-gard-rimedo,
grava por virinoj! Tavol-
etaro Mk. 100 + sendkosto.

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO,

51, rue de Clitchey, Paris.

Eldonejo kaj vendejo de la
Verkoj de Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof
kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:
Fundamenta Krestomatio, entenananta la „Ekzerco”-n
(el la „Fundamento de Esperanto”), „Fabeloj kaj Ra-
kontoj”-n, „Artikoloj pri Esperanto”-n, „Poezioj”-n.
Unu dikta libro 460-paĝa . . . Franc. Frankoj 8 —
George Dandln, komedio en tri aktoj de Molière.
Unu libro grandformata . . . 2 —
Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare.
Unu libro mezformata . . . 3 —
Ifigenio en Taurido, dramo en kvin aktoj de Goethe.
Unu libro grandformata . . . 6 —
Proverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazologio
rusa-pole-franca-germana” de M. F. Zamenhof (1232
proverboj). Unu libro grandformata . . . 3 —
La Rablotoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu
libro grandformata . . . 4 —
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N.V. Gogol.
Unu libro grandformata . . . 4 —

Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reaperontaj:
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto. Unua libro grand-
formata . . . —
Marta, rakonto de Eliza Orzeszko. Unu libro grand-
formata . . . —
La Rabeno de Bahara, romano de H. Heine. La
Gimnaziano, monologo de Salom Alajhem. Unu
libro grandformata . . . —
Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo”. Unu
libro grandformata . . . —

Oni aldonu al la prezoj, plie por la sendkosto: 15% +
0,25 flk. en Francujo; 20% + 0,75 flk. en aliaj landoj

POR KRISTNASKO ni rekomendas:

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof. Inda memor-
libreto, presita sur luksa papero, kun multaj ilustr-
aĵoj laŭ originalaj fotoj.
Taglibro de vilaĝpedejo. Interesa romansimila ra-
konto. De la dana verkisto Blicher. Tradukita de
s-ano Bulthuis, L. K.-ano. Rekomendita de Esper-
antista Literatura Asocio.
Oni ridas. Bela kolekto de veraj perloj de bonhu-
moro kaj spirito. De s-ano O. Rieck. Rekomendita
de Esp. Lit. Asocio kaj reviziita de Zanoni, literatura
redaktoro de ET.
La prezoro legu en aliaj numeroj de ET aŭ demandu ĉe
la eldonejo, aldonante nove stampitan respondkuponon
aŭ frankitan respondkarton.
Butin & Jung, Godesberg, Germanlando.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esper-
antisto” (d-ro E. Pfeffer), Wien III/1, Postamt 34.
Belgia: Frans Schoofs, 48, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝteka n-o 284-20.
Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 18 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Fr. Ganchevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto Šklenka, Hradec Králové, Otto Lumpe, Trautenu.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B, Kasarminkatu 2, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clitchey, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy
Cataluña.
Hungara: Paŭlo Balkányi, Halos-utca 15-12, Budapest VI.
Italia: Itala Esperantista Federaco, Casella Postale 25, Verona.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aolama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvia: Talvaldo Indra, Rīga, Pasta kaste 478.
Litova: Paŭlo v. Medem, Šmelu g-vė 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein Jr., v. Aerzenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝt-
ceka konto Haag n-o 2573.)
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-
Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U.,
Moskvo, poŝtkasto n-o 650.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. s., Sio-holm 1.
Sviz: Esp. Librejo „Verda Stelo”, Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 22, Washawken N. J.

Kvin amikoj deziras korespondi kun alilandaj gesamide-
anoj per leroj aŭ poŝtkartoj ilustr. Skribu al Albert
Klemm, Maria-Theresienstr. 9, Gladbeck i/W., Germanujo.
Anoj de la Esperanto-grupo en Wiedorf deziras kore-
spondi kun la tuta mondo per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj
kaj interŝanĝi gazetojn kaj Esperantojn. Turnu vin al
s-o Adolf Wiesner, Wiedorf apud Köln Kölnstrasse 281,
Germanujo.

Filatelistoj! Mi vendas diversajn poŝtmarkojn bulgariajn
Mi send-s ankaŭ specimenojn por elekto kontraŭ rekom-
endo aŭ depopago. Konstantin Vasilev, Andreeva 1,
Rusuko, Bulgarujo.

25-jara komercisto de la vestofako serĉas korespondadon
pri komercaj temoj, precipe kun partoprenantoj de la
XV-s. Skribu al: Siegfried Baer, Roth bei Nürnberg,
Bayern, Germanujo.

S-o Arthur Boulade, Van Artevelde 75, Antwerpen, Belgujo
deziras korespondi kun alilandaj samideanoj.
F-ino Maria Lerno, Vrijheidsplein 2, Lokeren, Belgujo,
deziras interŝanĝi kartojn ilustr. lerojn kaj poŝtmarkojn
kun ĉiuj landoj.
Poŝtkartojn ilustr., lerojn kaj poŝtmarkojn interŝanĝas
kun gesamideanoj de la tuta mondo: Robert De Jaeger,
Markt 1, Lokeren Belgujo.
S-oj Sven V. Johansson, St. Nygatan 32, Gislaved, kaj
Sven Ho', Gyllenfors, Gislaved, Svedujo, deziras kore-
spondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. Petas
legeblan adreson.
S-o Ignasi Coma, G Juehus N. 8, Manresa, Hispanujo,
deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo
per ilustr. poŝtkartoj aŭ leroj pri pejzaĝoj, kustumoj,
historioj, legendoj kaj simlaj temoj, kiel ankaŭ pri
elektro kun ĝiaj plej novaj eltrovaĵoj.

BALDAŬ APEROS:
„PRETER LA VIVO”
POEMARO DE
JULIO BAGHY.

SUR BONA PAPERĜ, EN LUKSA VESTO, APEROS 80
ORIG. POEMOJ DE LA POETO KUN LIA PORTRETO
KAJ ANTAŬPAROLO DE K. DE KALOCSAY. (100—120
PAĜOJ) LA EKZEMPLEROJ ESTOS NUMERITAJ KAJ
HAVOS PROPRAMANAN SUBSKRIBON DE LA AŬTORO.

ABONPREZOJ:
POR ORDINARA ELDONO . . . 1 SV. FK.
POR LUKSA ELDONO KUN PORTRETO . . . 2 SV. FK.
MENDU ANTAŬ APERO, CAR POST APERO LA
PREZO PLIALTIĜOS! SENDU LA MONON EN NACIAJ
BANKBILETOJ AL ADRESO: „LITERATURA MONDO”
BUDAPEST VI, ANDRASSY UTCA 31. II, 192.

Importo. Eksporto.
Pollanda Komerc Agentejo
Adolfo Oberrotman, Varsovia, Krak.-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn
kun gravaj eksterlandaj firmoj,
speciale en teknikaj maŝinoj,
manufakturo kaj galanteriaj arti-
tikoj; donas ĉiujn informojn pri
la polaj komerclokoj.

Nur pogranda firmoj bonvolu sendi ofertojn
kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

Kongresanoj por la XV-a.

- Zamenhof Klara, s-ino, Varsovio.
- D-ro Steche Albert, Leipzig.
- D-ro Dienerle Leipzig.
- Mammen Magda, s-ino, Grenaa.
- Kreuz Robert, Frankfurt a. M.
- Kreuz Tilly, s-ino, Frankfurt a. M.
- de Rycke Marguerite, f-ino, Gent.
- D-ro Döhler Walter, Riesa a. E.
- Döhler s-ino, Riesa a. E.
- Grenkamp-Kornfeld Salo, Jaslo.
- Cuzion Leopold, Paris.
- Isbrücker J. R. G., s' Gravenhage.
- Isbrücker-Dirksen J. C., f-ino, s' Gravenhage.
- D-ro Hanauer Julius, Charlottenburg.
- von Ham Simon, Zuidhorn.
- von Ham-Robroch Tryntje, Zuidhorn.
- Essigmann Stanislaw, Varsovio.
- Essigmann Thekla, s-ino, Varsovio.
- van Doorne C., Rotterdam.
- van Doorne Nelly, s-ino, Rotterdam.
- Schade Emil, Wien.
- Zoubek Eduard, Wien.
- Janečka Arnošt, Vítkovice.
- Brunet Charles, Bordeaux.
- Strauss Rudolf, Halle a. S.
- Hoffmeister Albert, Hamburg.
- Holmes John Thomas Shipley.
- Holmes Mary, s-ino, Shipley.
- Stewart Robert, Glasgow.
- Stewart Katharine B., s-ino, Glasgow.
- Nicol Alison A., f-ino, Glasgow.
- Nicol Agnes B., f-ino, Glasgow.
- D-ro Eastmont John Ebenezer, Bournemouth.
- Kennedy Meg, f-ino, Dennistoun, Glasgow.
- Doerfler Karl, Mühlhof a. l.
- D-ro Höppner Wilhelm Ludwigslust.
- Höppner Elisabeth, f-ino, Rostock.
- Minor Karl, Hamburg.
- Minor Jenny, s-ino, Hamburg.
- Jung Teo, Horrem b. Köln.
- Jung Heinrich, Horrem b. Köln.
- Jung s-ino, Horrem b. Köln.
- Jung Maria, f-ino, Mehlern a. Rh.
- Hurler Hans, Köln a. Rh.
- Goppel Ludwig, Horrem b. Köln.
- Hahn Philipp, Horrem b. Köln.
- Feihke Edmund, Horrem b. Köln.
- Fabel Isold, f-ino, Horrem b. Köln.
- Alendorf Grete, f-ino, Köln a. Rh.
- Gerisch Hugo, Auerbach i. Vogtl.
- Gerisch Elae, s-ino, Auerbach i. Vogtl.
- Gerisch Grete, f-ino, Auerbach i. Vogtl.
- Gerisch Hilde, f-ino, Auerbach i. Vogtl.
- Altnöder Josef, Regensburg.
- Obermaier Heinrich, Grönsdorf.
- Obermaier, s-ino, Grönsdorf.

Kiu ne jam aliĝis, aliĝu tuj!

S-o Karl Pressel Kuimets, Juuru, Estonujo, deziras inter-
ŝanĝi poŝtmarkojn (stamptajn) kontraŭ poŝtkartojn ilustr.
Li deziras ankaŭ korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj
landoj.

Otto Nitsche, Berlin, Petersburgerstr. 46, sendas tuj 100
germanajn poŝtmarkojn por la sama kvanto de alia lando.

Feliko Jašoro, ĉe la Grupo Esperantista, str. Merced 1,
Bilbao (Hispanujo), deziras korespondi kun portugaloj,
rusoj, danoj, norvegoj, svedoj, baltikanoj kaj ekster-
eŭropanoj

S-o Frans Albert Quist, Hola Folkhögskola Prästm-n.
Petrus Thelin, Hvolmsta N-rdingrå Emil Olsson, Sol-
söher, Algot Sohlin Almajón Ul Önger kaj Otto Mélander,
Hola Folkhögskola Prästm-n en Svedio, deziras
korespondi kun gesamideanoj en tuta mondo.

Rim. de Red. Se tiu ĉi anonco enhavas ankoraŭ
erarojn, bonvolu ne riproĉi nin, ĉar ankaŭ la duafoje
senditan manuskripton ni ne povis decifri en la sved-
lingva parto.

Ernst Hohl, Trautenu, Trautenbergstr. 31, Bohemlando,
deziras korespondi kun la tuta mondo per leroj kaj
vidajkartoj, interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Alois Dörner, komercisto, Trautenu, Kirchenlaube 52,
Bohemlando, deziras interŝanĝi kun gesamideanoj en la
tuta mondo ilustr. poŝtkartojn (bfl.), papermonoj kaj
poŝtmarkojn.

Filatelistoj atent! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn el
ĉiuj landoj. Ĉiuj filatelistoj turnu sin koncerne inter-
ŝanĝadon al s-ino Stefi Stástiná, Turnov 36, Ĉeĥoslovakio.
Konstanty Chmielewski, libristo, Bydgoszcz (Polio), Kor-
deckiego 1a, volas interŝanĝi polajn poŝtmarkojn pogrande
(de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur ne-
difektitajn.